

NIA FOLIETO.

JARA Abonprezo :

Enlande Fr. 2,00
 Fremdlande Fr. 2,50
 aŭ 10 respondkuponoj in-
 ternaciaj, haveblaj ĉe la
 pos-toficejoj.

LA PROGRESO »

Esperanto-klubo

REDAKTEJO :

V. Hendriex
 Zalmstraat 43
 GENT — Belgujo.

KORESPONDADO :

Ĉiu dulinia anonco kostas
 du respondkuponojn.

Ĉiu abonanto rajtas fari
 unu enpresajon senpage.

Avizo al la kunlaborantoj : Ne subskribitaj artikoloj ne estas akcepteblaj. Se ĝirinde oni aldonu pseŭdonimon publikigotan. Nur la subskribintoj restas respondaj la artikoloj enmetitaj. La artikoloj ne enserititaj ne estas retrosendataj.

El la Redaktejo

Per ĉi tiu numero finiĝas la dua jaro de la vivado de Nia Folieto. Fondita dum junio 1918, elirante nur unuekzemplere, manuskribite pro la tiamaĵ cirkonstancoj, Nia Folieto aperis presite de post Septembro 1919, kaj nun eniras sian trian jaron.

Kuragigita per la multnombraj aligoj, ĉu en- ĉu eksterlandaj, N.F. esperas nun ankoraŭ je ĉies kunhelpo.

Neniu kulpigos nin kiam ni diros ke la abonprezo devas esti altigata, ĉar ĉiufanke ni nur aidas pri altigo de prezoj. Ni do fiksas la jaran abonprezón por N. F., por la jaro 20-1921 je 2 Fr. enlande, kaj 2,50 fr. eksterlande. La altigo de la abono ja ne estas ti gravaj kiel ĝi devas esti pro la nunaj kostoj, kaj ni do kalkulas ke ĉiuj niaj abonintoj bezitos reaboni, ke ili sendos tuj la abonprezon, kaj abonigos ankaŭ siajn gekonatulojn.

Rimarkoj pri la pagado :

Belgujo : Ni enkasigos per la pos-to la sumon de 2,10 fr. kiel reabonon de la Belgaj abonintoj. Ili bonvolu konsideri ĉi tion kiel avizo, kaj zorgi ke la kvitanco kiu sekvas post kelkaj tagoj, estu bone akceptata.

Fremdlando : La abonprezo por fremdlando (2,50 fr.) estas pagebla :

1^o el ĉiuj landoj : per 10 respondkuponoj (oni atentu ke la resp. kup. estu stampigitaj, kaj plenvvaloraj. Oni informu ĉe la pos-toficejoj. Senvaloraj resp. kup. estos retrosendataj). 2^o Landoj kun alta monvaluto : la abonantoj bonvolu kalkuli laŭ la valoro de la spesmilo : 2,50 fr. = 1 Sm., por ne kaŭzi erarkalkulon pro la kurzoj. Ni tamen akceptas pos-tmandatojn laŭ kurzalkulo, sed oni sendu por ĉiu abono almenaŭ valoron egalan al 2,50 frankoj Belgaj.

Sendu tuj la abonpagon ! Ne forgesu la mofondaj-on !

N. B. Ĉiuj mousendoj kaj rekomenditaj-oj devas porti la nomon de la redaktoro.

Senpagan abonon ? Kiel akiri ĝin ?

Ĉiu persono kiu sendas al ni la abonprezon de 10 abonantoj, ĉu en- ĉu eksterlandaj, ricevos senpage Nia Folieto'n. Propagandistoj, profitu de tio. Klopodu tuj !

La Komitata Kunveno de la Belga Ligo Esperantista.

okazinta la 1-8-20.

La kunsido malfermiĝis je la 10a. La Prezidanto, S^{ro} Witteryck estante malhelpita, S^{ro} L. Cogen, vic-prezidanto, prezidis.

1° *Propono de S^{ro} Otlet pri enkonduko de Esperanto ĉe la internacia Universitato*: S^{ro} Mathieux interrilatos kun S^{ro} Otlet por scii, kion la Ligo devos fari por sukcesigi tiun proponon. La Ligo aligos al la dusemajna Kongreso de la « Unuigo de la Internaciaj Asocioj », kiu okazos en Bruselo de la 5a ĝis la 20a de septembro venonta. Estas dezirinde, ke ĉiuj Esperantaj Asocioj estu ankaŭ reprezentataj. La Belgaj anoj de tiaj Asocioj penu por ilin reprezenti. Personaj klopodoj estos farataj ĉe diversaj eminentuloj por peti ilian apogon.

2° *Enkonduko de Esperanto en la lernejoj*: Tiacele, S^{ro} Champy proponas, ke oni klopodu ĉe la kompetentaj aŭtoritatuloj. S^{ro} Varendonek faras la jenan proponon: Peto al la Ministro de la Sciencoj kaj Artoj:

a) Enprenigi en la programon de la Normalaj ŝtatlernejoj la studon de Esperanto kiel libera lernofako.

b) Organizati ekzamenojn por la akiro de diplomoj: 1° pri kapableco, 2° pri profesora kapableco.

c) Akordigi al la kiel profesoroj de Esperanto diplomitaj ĝeinstruistoj la samajn favorojn akorditajn al la posedantoj de specialaj diplomoj, t. e.:

1° Laŭlego, unu jaro da profito por la kalkulado de la pensio.

2° Akordigo de ŝtatsubvencioj al la diplomitaj kaj al la organizantoj de Esperantaj kursoj specialaj (en la lernejoj).

d) Enskribigi Esperanton en la programo de la 4a grado (elementa Instruado).

e) Enskribigi Esp. en la programo de mezgradaj lernejoj kaj Ateneoj.

f) Enskribigi Esp. en la programo de la Komercerleĝoj de Antverpeno.

Raporto pri la motivoj estos preparata.

Subkomitato estas difinita por studi tiun proponon kaj por fari enketon por scii, kiuj estas la plej taŭgaj lernolibroj uzeblaj nune. Ĝi estas kunmetita jene; F^{no} Jennen, S^{roj} Haine, Henraut, Jacobs kaj Varendonek. S^{ro} Jacobs sendos, fine de Aŭgusto, raporton pri Enkonduko de Esperanto en la lernejoj, kaj S^{ro} Varendonek pri la lernolibroj.

3° *Kiel havigi monon al la Ligo*:

a) Plialtigante la kotizaj-ojn kiel jene: Grupa kotizaj-o: 0,50 fr. po membro (minimume 10 fr.) — Unuopaj membroj: 5 fr. aŭ 50 fr. unu fojon por ĉiam. — Protektantaj membroj: 25 fr. aŭ 500 fr. unu fojon por ĉiam. — Bonfarantaj membroj: 50 fr. aŭ 1000 fr. unu fojon por ĉiam.

b) Per starigo de Akcia societo: S^{ro} Pirnay proponas ke oni starigu akcian societeton por eldoni ĵurnalojn, lernolibrojn, propagandilojn, k. e. Subkomitato konsistanta el S^{roj} Champy, De Maertelaere, Pirnay kaj Schoofs studos tiun proponon. S^{ro} Champy raportos dum la venonta kunveno.

4° *Propagandaj rimedoj*: Oni decidis eldoni Propagandan bultenon el kiu la grupoj elĉerpos artikoletojn por la ĵurnaloj.

La Ligo akiras la librojn kaj « Belga Esperantisto » kun ĝia materialo (dokumentoj kiuj apartenas al la nunaj posedantoj de B. E.) je la kondiĉoj petitaj de ili.

Oni penos reaperigi, je la 1^a de januaro 1921, la nacian organon, almenaŭ ĉiudumonte, kaj se eble kun 16 paĝoj.

La grupoj arangos sian kotizaj-on tiamaniere ke ĝi enhavu la abonkoston de la revuo.

La Redakta Komitato konsistas el S^{roj} Cogen, Parotte, Petiau, Schoofs, Van Schoor kaj Witteryck.

5° *Organizado de la Propaganda Laboro*: La sekretario atentigas la delegitojn pri la neceseco centraligi la laboron kaj allasi al la Ligeŝtraro la zorgon arangi la ĝeneralan propagandon. La grupoj estas insiste petataj difini personon kiu faros, almenaŭ ĉiunmuate, raporton al la Liga Sekretario pri la agado de sia grupo, ĝiaj bezonoj kaj proponoj.

6° *Generalo Leman*, favora al nia movado, estis petata fari ĝi Honora Prezidanto de la Ligo, kaj tre afable akceptis.

7° *La Ligeŝtraro* estas reelektita unuanime: Prez.: S^{ro} Witteryck; Vic. prez.: S^{roj} L. Cogen kaj L. Champy; Ĝen. sekr.: S^{ro} H. Petiau; Kas.: S^{ro} F. Mathieux.

8° *La ĵugantaro de la Ekzamenoj* estis reelektata jene: Prez.: S^{ro} L. Delvaux; F^{no} M. A. Jennen kaj S^{ro} Maertens, ĝeĵugantoj; S^{roj} Parotte kaj Varendonek aŭstataŭntoj.

9° *Ekzamenoj pri simpla kaj pri profesora kapableco* okazos se eble dimanche la 3^{an} de Oktobro venonta, en urbo difinita laŭ la nombro da kandidatoj.

La grupoj estas petataj konigi al la Liga Sekretario, antaŭ la 15^{an} de Septembro, la nomon kaj adreson de siaj gekandidatoj.

10° F^{no} Jennen estis difinita kiel Belga del. al la XII^a Intern. Kongr. de Esp. en Den Haag. Ĝi klopodos por ke la Belga Registaro sendu oficialan delegiton al la XII^a.

Fine S^{ro} Mathieux speciale insistis pri la neceseco kaj utileco de bona, remulte-kosta broŝureto. La sekretario sin okupas pri tio.

Ni faras varman alvokon por ke ĉiuj grupoj kunlaboru al la revivigo de nia movado, kaj ke ili sendu regule ĉiujn novajojn al la Ligeŝtraro, kaj al la redakto de Nia Folieto, Zalmstraat, 43, Gent, Belgujo.

Gelegantoj helpu: La klubo « La Progreso » kolektas ĵurnalartikolojn pri internacia lingvomovado. La personoj kiuj posedas aŭ povas havigi tiajn, bonvolu ilin sendi al F^{no} Doutreligne, Place du Commerce, 11, Gand, Belgujo.

Antaŭan dankon!

Tagoj de Amo kaj Poezio (daŭr. de p. 56.)

... Aŭskultu, Maksimo- daŭradis Dora-, se mi estus koninta ĉin de la komenco de miaj esperantaj rilatoj vivanta kun Isabel, eble mi riproĉus al mi mem esti apartiganta ĉin de ŝi, ĉu pro ŝia ribelema karaktero pri obeemo kaj rezono, ĉu pro nula partopreno de ŝi en ĉia intelekta vivado, kaj ke ĉi estis trovanta en mi superan virinon; mi pensus ke eble mi estis la nereakta kaŭzo de via apartiĝo kaj eble miaj konsciaj skrupuloj malpermesus al mi la konfeson de mia amo por ĉi.

Kaj prenante inter siaj delikataj, etaj, engantitaj manoj la kapon de Maksimo, Dora aliris lin al si kaj donis al li longan kison sur la okuloj.

La serioza kaj parsimonia anglineto transformiĝis je amema konfidema kaj dolĉa virino. Ĝi estis trovinta homon kiu inspiris al ŝi senliman konfidon kaj malfermis al li siajn koron plenan da amemocio.

— Kaj ĉiaj gepatroj supozas ke ni amas ni- diris Maksimo malsuprenirante de la fantazia ĉielo ĝis la reala vivado.

— Ili ne supozas ĝin, Maksimo, ili scias ĝin. Mi sciigis ĝin al ili, kaj kiam mi skribis al ĉi la leteron en kiu mi sendis al ĉi mian koron, jam mia familio sciis ke mi

amis cin de longtempe. Mia patro, al kiu mi konfidis ĉiujn miajn g'ojojn kaj malg'ojojn, ĉar li penis pli bone ol mia patriino gajni mian konfidon, ĉiam kiam mi ricevis leterojn de ci el Meksikujo rakontante al mi ĉiajn batalojn kaj malplac'ojn, li rimarkis en mia voco kaj sinteno tiom da simpatio, ke iom post iom li ekamis ĉin ankaŭ. Ci scias ke li estas progresemulo kaj estas fiero ke mi, lia plej amata filino estu influiganta en ĉia vivado, por larg'igi ĉiajn ideojn kaj kriterion, kaj kiam mi diris al li ke mi amis cin, li konsideris ĝin kiel natura afero. Ĉar mia patriino, kiu pro siaj jaroj kaj sia inklino al la tradicioj, estas iom konservativa, diris al mi ke ŝi ne konsideris strange ke mi amus cin. Ci estas ja bona anca.

— Volu Sorto ke saman bonancon mi havu en Barcelono por akiri fiksan laboron, ĉar tiu ĉi vagabonda vivado mortigas tiujn kiuj ne estas naskitaj por vagabondadi.

— Jes, Maksimo, ci jam suferadis dolorajn provojn, kaj mi ne povas kompreni la konduton de ĉiaj amikoj kaj samideanoj en Meksikujo. Almenaŭ ili povus sendi al ci kelkajn literojn por kurag'igi cin.

— Mi konas ilin sufiĉe por dubi pri ilia amikeco — respondis Maksimo — kaj se ili ne skribas al mi, ne estas por manko da estimo aŭ kunfrateco, sed ili laŭ la plej granda parto el la mondo ne konas la g'ojegon, la delikatecon de inters'angrado de skribitaj pensoj. Skribi estas por ili turmento, peza laboro, enuiga tasko. Ili nur skribas por aferoj aŭ por prifrakti ion kio bezonas tujan solvon, sed neniam konsideras leterojn kie oni gravuras ideojn, kiel ilo de arto, de poezio, de rafinita kulturo. Ili ne scias ami je interspaco; ili bezonas havi antaŭ si la vivantan materion el viro aŭ virino kiu ili nomas sia amiko, por ke ilia animo povu vibradi, por ke ili povu sperti la altegan sensacion nomata amo. Kaj pro tio, amo kaj amikeco kiu s'ajnas esti tre firma, tiel facile mortas pro la apartigo.

— S'ajnas al mi ke ci trograndigas la aferon Maksimo, ĉar mi estas leginta multe da hispana kaj franca literaturo kaj mi konstatis ke vi, latinoj estas tre pasiaj kaj ke kiam vi ĝefianĉig'is vi skribadas unu al la alia ĉar trifoje ĉiutage.

— Sed tio ne estas skribi — protestis Maksimo —, tio estas « bleki » letere! Tio estas elmontrada de kelkatempa frenezo, de cerba vundo, de mensa malforteco. Ci legas milojn da leteroj el tiu speco kaj ci ne trovas tie ĉar unu penson aŭ ideon. Ĉio estas malnobleco kaj malspriteco.

— Mi ne komprenas cin; kiel skribi al la amata virino en pasia tono povas esti malspriteco aŭ malnobleco?

— Jes, ĝi estas malnobleco ĉar la viro mallevig'as ĝis fari idolon el alia estaj'o kiel li. Li metas flanke sian propran indecon por « kisi la polvon kiun siaj piedoj pas'as dum mars'ado » aŭ « por ĉiam restadi ĝenufleksita antaŭ ŝi admiranta sian marmoran kolon » kaj aliaj malsag'aj'oj, kiuj kvankam hiperbolaj, tamen naŭzigas la virojn kiuj estas konsciaj pri sia rolo en la vivo. Ĉu ci estus plac'ita per tiu ĉiutage flatado, per tiuj senspritaj mensogoj?

— Ne, tute ne — diris Dora — simila viro inspirus al mi malestimon.

— Do, tiuj amleteroj aŭ tiele nomatoj, estas fakte aro da juroj kiuj nemankeble neniam realig'as. Kiam la « malsaneco » de tiu kaprico forpasas, aliaj « marmoraj koloj » kaj « stelaj okuloj » inspiras novajn kantojn al tiuj mensogistoj de la plumo. Kaj se iam ili edzig'as ĉio fumig'as. La vera amo devas havi alian bazon ol la fizikaj ĉarmoj aŭ la karnaj instinktoj.

— Ci estas prava, kaj krom tio, amo devas proporeii al la geamautoj peron por morala perfektig'o. Aliaflanke mi komprenas ke ni virinoj estas iom kulpaj pri la viraj komedioj. Se ni anstataŭ zorgi pri la beleco de la viro kiu enamigas nin, se anstataŭ doni pli da atento al tio kion li havas ol kio li estas, se ni postulus de li karakteron kaj virtojn, anstataŭ flataj'ojn kaj mensogojn por kontentigi nian vanecon, ni ne kurag'igus tiujn bestac'ojn kiuj kaŭzas tiom da malbono al nia socio jam sufiĉe mals'atinda.

Unua diskutanta kunveno de la Esperantistoj de Iberaj Landoj (U. D. K. E. I. L. O.)

Kvankam ni ne suferis la terurojn de la militigo, tamen ili estis sufiĉaj por alporti al ni la maltrankvilecon kaj haltigi momente la Esperantan movadon. Sed dank'al la klopodoj de S^{ro} Romulo, S. Rocamora, post multaj laboroj kaj klopodoj sukcesis kunigi la plej fervorajn esperantistojn por okazigi la U. D. K. E. I. L. O. kies celo estas revivigi la esper. movadon en nia lando kaj interrilatigi kun niaj Portugalaj najbaroj. La alig'oj ne prokrastig'is kaj krom tio, la katalunaj urbestroj, ankaŭ respondis monhelpante kaj dezirante bonan sukceson al nia entrepreno.

La Hispana gazetaro antaŭvidante la sukceson, publikigis longajn raportoju pruvaute ke Esperanto ne mortis: sufiĉis bruligi nur alumedon por reŝlamigi la torĉon duonestingitan, reorganizi la grupojn de kiuj nur restis por multaj el ili la flago kaj la stampilo.

S^{ro} Romulo, S. Rocamora, povas esti fiero se li laboris, liaj penoj estis sufiĉe rekompencitaj pro la sukceso.

Dank'al li, Esperanto en nia lando vivos, kreskos kaj floros.

Leonardo Renom (Prezidanto de Ĉiam Antaŭen.)

Esperantistoj! Propagandistoj! Memoru ke la ĉiama videbla portado de la Verda Steleto estas unu el niaj plej malkaraj kaj tamen plej efikaj rimedoj: ĝi efektive montras nian ekzistadon.

Por organizi tiun propagandon sur pli firma bazo, estis fondata: La Fratara de la Verda Stelo, al kiu povas anig'igi ĉiuj Esperantistoj povantaj paroli pri ĉiutage aferoj, kaj kiuj subskribas la promeson: ĉiam porti videble la stelon. Aliaj kondic'oj ne ekzistas: la anig'o estas senpaga. La varbado okazas ĝenerale perbus'e, ĉar la varbanto devas certigi pri la kapableco de la varboto. Ĉar povas nun okazi ankaŭ ke persono, portanta ĉiam la steleton, ne konas iun fraton, kaj deziras tamen anig'i, tiuokaze tiu persono petu de konata delegito aŭ profesoro de Esp., certigilon pri sia kapableco, kaj sendu tiun ĉi, kun 1 resp. kup., al S^{ro} Goodliffe kiu sendos la alig'karton kaj, se necese, pliajn klarigojn. Post la akcepto kiel frat-in-o, oni ricevas 3 pliajn alig'ilojn per kiuj oni varbu novajn gefratojn!

Estas jam anoj en pli ol 20 landoj, kvankam pro la prefera bus'a varbado, la anaro ne multe povas progresi.

Ĉiujn pliajn detalojn volonte donos (kontraŭ respondkuponon):

S^{ro} F. A. Goodliffe, Lamley Lodge, Church Hill, Purley — England (Anglujo) aŭ S^{ro} Hendriex V., Zalmstr. 43, Gent, Belgujo.

Al Socialistoj: La Portugalaj socialistoj deziras koni la opinion de la ĉiulandaj socialistoj pri la partoprenado en la Burg'aj registaroj, kaj petas informojn laŭ jenaj demandoj:

a) Kia estas via opinio kaj tiu de la tiea Socialistaro kaj ĝiaj gvidantaj komitatoj pri la laborista partopreno en la Burg'aj registaroj?

b) Ĉu la socialistoj devas forlasi la klasbatalon por kunlabori kun la Burg'ularo?

c) Ĉu la kunlaborado de Socialista malplimulto en Burg'a Registaro povos alporti kelkajn profitojn por la Proletariaro?

d) Ĉu en via lando estas aŭ estis kelkaj Socialistaj ministroj en Registaro? Kiam? Kial?

La respondoj devas, se eble, porti la stampon de la lokaj Socialistaj organizaj'oj, kaj devas esti senditaj al:

J. Pereira Junior, rua das Olarias, 70-4^o-D, Lisboa, Portugalujo.

Al la Kristanaj Esperantistoj el ĉiuj eklezioj kaj nacioj! La naskigo de la movado por la efektiva de *Kristana Internacio* ne povus ne vekti la intereson de la Esperantistoj kiuj salutas Jesuon, kiel la rivelinton de la universala patreco de Dio, kaj la frateco de la homoj. Tiu ĉi okazajo devas impresi ilian kristanan konsciencon kaj ilian esperantistan animon, ĉar la lingvo de D^{ro} Zamenhof estis elektita kiel lingvo komuna kaj oficiala, de post la unua Konferenco kiu okazis en Bilthoven (Nederlando), dum Oktobro 1919.

Dum tiu Konferenco oni decidis eldoni organon propagandan, (Anglan, Francan, kaj Germanan, aparte). En ĉiuj tri eldonoj aperis, Esperantlingvo, la Manifesto akceptita de la Konferenco.

Ĉiuj personoj kiuj interesigas pri tiu movado homama, povas ricevi senpage tiun unuan numeron ĉe:

(Angla eldono): Oliver Dryer, 17, Red Lion Square London W. C. I. Anglujo.

(Franca eldono): Léon Revoyre, 37, rue de la Fosse-aux-Anglais, Melun (S. et M.) Francujo.

(Germana eldono): Otto Roth, Roberstrasse 55, Dortmund, Germanujo.

aŭ ĉe la ĝenerala sekretario: S^{ro} Kees Boeke, 't Boschhuis, Beeklaan, Bilthoven, Nederlando.

Al ĉiulandaj katolikoj: Ĉu vi deziras rilati kun samcelanoj en la tuta mondo? Aŭg^u al la Internacia Katolika Unuigo Esperantista (I K U E); abonu ĝian organon: *Espero Katolika*, monata ampleksa revuo (24-32 paĝoj). Abonprezo 5 Sm. (laŭ nacia valuto). Duonabonoj estas akceptataj por la periodo Julio-Decembero 1920 je 6 frankoj.

Tiaj abonantoj havos plenajn raportojn pri la 6^a tutmonda Kongreso de katolikaj Esperantistoj, kiu okazis en Den Haag (Nederlando) la 15^a kaj 16^a de Aŭgusto (post nia XIIa)

Ĉiuj societoj de Esp. katolikoj, kaj ĉiuj unopaj katolikoj estas petataj sendi nomojn, adreson kaj profesion.

El *Espero Katolika* de Julio ni elĉerpas jenon pri internacia katolika pacprogramo:
 "..... 3. — Ni postulas kiel komenco de konstanta mondpaco, deflankigon de la intereso de ĉiuj popoloj kontraŭ imagita ekstera malamiko kaj alcentrigon de ĉiuj fortoj kontraŭ la fakta interna malamiko komuna al ĉiuj popoloj: *alkoholismo, malmoraleco, seksaj malsanoj, tuberkulozo, degeneracio, mon-haj terkapitalismo, pauperismo nesufiĉa nutrado, ktp.* (kaj militarismo, N. d. l. R.)

"4. — Ni postulas cedon de senseca konkura armoo kaj alcentrigon de ĝiaj iloj por pozitivaj kulturaj taskoj...

"... 10. — Ni postulas novan formadon de la edukado de la kreskanta junularo, evitantan ĉiun s'ovinismon, ĉiian nutradon de milita spirito, per vekigo de socialaj devemo, veremo, honesteco, malegoismo, justeco, helpemo kaj prirespondeco..."

Internacia Kongreso de la Libera Penso. — La Internacia Federacio de la Libera Penso (L. P.) decidis okazigi dum 1915 kongreson en Praha (Ĉeĥoslovakio) por memori la 500^{an} datrevenon de la martirmorto de la granda Ĉeĥa reformisto Jan Huss. La milito malhelpis ĉi tion.

La Ĝenerala Konsilantaro kunvenis la 28^{an} de Decembro 1919 en Bruselo kaj fiksas la daton de la 18^a Internacia Kongreso de la L. P., kiu okazos en Praha, je la 5-9 de Septembro 1920.

La celo de tiu kongreso estos triobla: 1^o: rememorigi Jan Huss; 2^o: protesti kontraŭ la klopodoj por pliproksimigi la civilan kaj religian povojn; 3^o: honorigi la junan respublikon kiu klopodas por laikigi ĉiujn siajn instituciojn.

Al la kongreso estas invitataj ĉiuj societoj de Liberpensuloj, logioj framasonaj, junularoj, liberalaj, respublikanaj kaj socialistaj societoj, kaj ĉiuj kiuj defendas la

principon de la libereco de la konscienco. Liberpensuloj, apartenantaj al neniu organizajo, estas ankaŭ invitataj. La kotizajo estas 20 fr.

La ĉefaj raportoj estos publikigataj France, Angle kaj Ĉeĥe, sed la Kongresa komitato decidis uzi Esperanton por la fremdlandaj korespondado.

Oni ankaŭ petis ke personoj, kiuj ne povas partopreni la kongreson, sed tamen simpatias kun ĝi, sendu je la fino de Aŭgusto, ĉu karton ĉu leteron simpatian al la komitato: Al la Kongreso de la Libera Penso; Praha, Stepanska 57, Lucerna, (Ĉeĥoslovakio); kaj ke oni preparolu ĉi tiun kongreson en naciaj gazetoj (ne forgesu sendi ekzempleron de tiuj publikigajoj).

Ekspozicio pri Konstruado — Gent — 1921: (laŭ De Technische Gids — Augustus 1920) Internacia Ekspozicio pri konstruado, konstruindustrio, kaj parencaj fakoj, okazos en Gent, dum la printempo de 1921, en la salonego de la Festpalaco (Parko), sub la aŭspicoj de la ŝtato, provinco kaj urbo.

La celo estas: kunlabori al la rekonstruado de detruita Belgujo per deca, utila kaj k. e. p. plena dokumentado.

La ekspozicio daŭros 2 monatojn, kaj havas jenan gravan programon: Konstruado ĝenerala; Konstruiloj, materialoj, dokumentoj; Konstruado kaj arangado de la domo; Malmultkostaj domoj; Sanigado de la domo; Lumigiloj kaj varmigiloj; Elektro kaj ĉiuj ĝiaj aplikadoj; Ornamarto; Luksaj kaj ordinaraj mebloj; Domkomforto; « Federacio de la Urboj »; Plibeligo de la kampara vivo; Malgrandaj iloj; Brosuroj, ĵurnaloj, revuoj kaj diversaj eldonaĵoj.

Kongresoj de arkitekturistoj, konstruentreprenantoj, ktp., okazos tiutempe.

Por pliaj informoj sin turni al la Administracio de la Ekspozicio, Coupure, 15, Gent (Belgujo).

(Al informpeto oni aldonu: « Voor kostelooze vertaling zich wenden tot Hendriex V., Zalmstraat 43, Gent »).

Oni povas ankaŭ rekte adresi ĉion al la redaktoro, kin peros senpage.

Komercistoj kaj Esperanto

S^{ro} J. Schuster, Ringstr. 31/2, Eger, Bohemujo, diziras interrilati kun fabrikistoj de tabuloj kaj lernejmabladoj, por la ĉiutaga patentrajto pri speciala, tre praktika lernejtabelo, elpensita de li. La afero estas profitdona, konsiderante ke tiuj tabuloj nun estas ege bezonaj ekz. en Nordfrancujo, Belgujo, Italujo, Polujo, Jugo-Slavujo, ktp. Interesatuloj aŭ peruloj tuj petu informojn!

S^{ro} Adolf Oberrotman, 10-13 Krak-Przedmieście, Warszawa, Polujo, (Del. U. E. A.) deziras reprezenti ĉiujn fremdajn firmojn por Polujo.

Ekspozicistoj tuj skribu.

Esperantistaj Grupoj, ĉu vi bezonas insignojn? Petu prezliston aŭ sendu (rekomendite) 45 kr. ĉeĥoslovakajn por modelaro. Specialaj insignoj laŭ desegno; petu kondiĉojn. Herman Röhlich, Del. U. E. A., Wasserg. 7-a, Jablonec n. Nisou, Bohemujo.

Bibliografio — Gazetaro.

BES-a ADRESARO de la Esperantistoj el ĉiuj landoj (2^a eldono) ĵus aperis. Tre bone kaj logike arangita ĝi enhavas multe da novaj adresoj kaj estas, same kiel la unua eldono, tute rekomendinda. Necesas nur ke la Esperantistoj helpu tiujn entreprenojn, kiuj multe utilos al ĉiuj, per multnombraj alig'oj.

La dua eldono kostas 1,50 fr. sv. pagebla per postmandato aŭ respondkuponoj. Laŭ specialaj favorkondicioj por Belgujo la prezo estas fiksita je 2,25 fr. Belgaj.

Tuj kiam estos necese aperos 3^a eldono.

La esperantistoj kiuj volas subteni la entreprenon aŭ enseretigi sian nomon kaj dezirojn, tuj petu prospekton kaj aligilon kontraŭ 1 resp. kup. La aligo al la 3-a eldono kostas 2 fr. sv. (3 fr. Belgajn) por personoj, 3fr. sv. (4,50 fr. Belgajn) por societoj.

Esperantista Laboristo : (Socialista, sindikalista, liberecana, internaciista). *Redaktejo :* E. Adam, 24 Blvd. Beaumarchais, Paris. — *Administrejo :* L. Glodeau, 177 rue de Bagnole, Paris, Francujo. Jara abono : Por la Esperanta parto: 5.50 fr. ; kun la Francilingva aldono : Le Travailleur Espérantiste : 7,50 fr.

Ni kore dankas pro la gazetoj ricevitaj :

Aplech'a Bulteno	Junio-Julio	The Gregg Shorthand Mag.	July
The British Esperantist	July-August	Intern. Komerca Revuo	Majo-Junio
Esperanta Finnlando	Julio	Laboro	Junio
Esperanta Ligilo	Julio	Letras	Julio
Esperanta (UEA)	Julio-Aŭgusto	La Progreso	Junio
Esperanto Trinifonta	2	pere de F ^{no} Dorsinfang.	
Espero Katolika	Julio (2)	O Socialista	18-19-20
Franca Esperantisto	Julio	La Verda Ombro	Junio 5-6

KRONIKO

ANGLUJO : London : London'a Esperantoklubo, St' Bride's Institute, Bride Lane, Ludgate Circus. Kunveno ĉiun vendredon kun jena programo :

- Sept. 3 Iom pri la vivo de H. D. Thoreaux (W. Banfield).
- " 10 Sekvoj el la Granda Milito (P. J. Cameron).
- " 17 Normandio kaj Bretonio (Lum-bildoj) (J. Bredall).
- " 24 Muzika Vespero.

AU-STRUJO : Graz : La Mondpacligo KRUCO BLANKA, internacia pacema unuigo katolika, destinas la helplingvon Esperanto'n kiel ĝia lingvo interpopola oficiala. Ĝi celadas kunigi la tutmondajn geamikojn de mondpacmovado katolika en « Internaciario Katolika ». Demandojn kaj aligojn akceptas por ĉiuj landoj : Mondpacligo KRUCO BLANKA, Graz, Karmeliterplatz 5, Au-strujo.

NEDERLANDO : Pri nia 12^a Kongreso, ni raportos en venonta numero.

POLUJO : Warszawa : La delegito arangis grandan UEA. ekskurson, kiun honorigis per sia creesto S^{ino} Zamenhof kun filino Lili. La sukceso estis neatendita.

BELGUJO : GRAVA VENKO : Generalo Leman, famkonata defendanto de Liège dum 1914, ĵus akceptis la honoran prezidantecon de la Belga Ligo Esperantista. Nedubeble tiu apogo revivigos nian movadon, kaj atentigos la registaron pri ĝi, ĉar Gen. Leman estas favora al la enkonduko de Esperanto en la lernejoj.

BELGUJO : Gent : Dimanĉon la 12^{an} de Septembro, okazos en la sidejo je la 10^a matene, la ĝenerala kunveno. Personoj kiuj deziras metigi punktojn sur la tagordon estas petataj ilin konigi skribe antaŭ la 5^{an} de Septembro.

Woluwe St Lambert : Blindula Grupo « Lumo en Mano » Direktoro : Frato Ludoviko. Blindula Instituto : Blvd. Georges Henri, Woluwe-St-Lambert (Bruxelles).